



Akademio de Esperanto

Sendependa lingva institucio fondita en 1905

PROPONO DE LA PREZIDANTO

2015-10-11

[La sola enhava ŝanĝo kompare kun la statutpropono de 2015-09-30 aperas en artikoloj 2.3 kaj 3.4, kie la vorto *samtempe* estas anstataŭigita per *tuj post*. La aliaj ŝanĝoj ne tuŝas la enhavon sed atentigas proponojn senditajn de Carlo Minnaja, Marc Bavant kaj Sergio Pokrovskij. La estraro ankoraŭ ne pritraktis la nunan proponon.]

## *Propono<sup>1</sup> pri nova*

# Statuto de Akademio de Esperanto

## Ĉapitro 1. Principoj

### Artikolo 1.1. Celoj kaj taskoj

Akademio de Esperanto<sup>2</sup> estas sendependa<sup>3</sup> lingva institucio, kies tasko<sup>4</sup> estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

Akademio de Esperanto transprenis la celojn kaj la taskojn de la antaŭa Lingva Komitato, fondita en la jaro 1905-a, kaj de ĝia Akademio. Ĝi daŭrigas la laborojn de tiuj lingvaj institucioj.

Akademio de Esperanto esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton. Ĝi verkas vortaron de Esperanto kun difinoj en Esperanto. Ĝi verkas faklingvajn terminarojn, kaj povas kontroli kaj aprobi tiajn terminarojn verkitajn de aliaj aŭtoroj.

---

<sup>1</sup>La piednotoj ne estos parto de la fina statuto. Ili estas enmetitaj, unue, por prezenti kelkajn el la klarigoj de la motivoj malantaŭ la propono (tamen la plej gravaj motivoj estas kolektitaj en kromsekcio 9.1); due, por kompari kun la nun valida statuto (redakta revizio de 2009-10; kelkaj komparoj inter la nuna kaj la proponata statuto estas prezentitaj en kromsekcio 9.6); kaj, trie, por starigi demandojn, ĉar ankoraŭ restas elektoj inter kelkaj alternativoj.

<sup>2</sup>Komparo inter Akademio de Esperanto kaj aliaj akademioj troviĝas en kromsekcio 9.2.

<sup>3</sup>Neniu homo, neniu organizaĵo estas vere sendependa: ni ĉiuj dependas unu de la alia. Sed ni konservu la esprimon, kiu ĉi tie signifas ke neniu organizaĵo rajtas ordoni ion al la akademio.

<sup>4</sup>Artikolo 1 en la nuna statuto havas la rubrikon “Celo” kaj artikolo 2 havas la rubrikon “Taskoj”. Sed en artikolo 1 oni unue skribas “kies tasko estas” kaj poste “la celojn”. Estas iom strange ke la tasko estas menciita unue kaj la celoj estas menciitaj nur poste en artikolo kies rubriko estas “Celo”. Pro tio nun celoj kaj taskoj estas kunigitaj en unu artikolo.

Ĝi povas kontroli la konformecon de lerniloj al la principoj de la lingvo<sup>5</sup> kaj povas ekzameni<sup>6</sup> aperintajn verkojn kaj kritiki ilin el lingva vidpunkto. Ĝi povas doni premiojn al la aŭtoroj aŭ al la eldonantoj de la plej bonaj aperintaj verkoj.<sup>7,8</sup>

## Artikolo 1.2. Jura sidejo

Akademio de Esperanto havas juran sidejon en Nederlando laŭ ties leĝoj.<sup>9</sup>

## Ĉapitro 2. Membroj kaj korespondantoj

### Artikolo 2.1. Membroj

Membreco en Akademio de Esperanto estas dumviva.<sup>10</sup> Ĝi povas ĉesi nur pro morto, pro libervola ekŝigo aŭ pro ekŝigo laŭ la preskribo en artikolo 2.7.

[*Alineo pri ne honora titolo forigita.*]

En ĉiu jaro la nombro de membroj, kiuj ne atingis kaj dum la jaro ne atingos la aĝon de sepdek kvin jaroj, ne estas pli granda ol kvardek.<sup>11</sup>

Por ĉiu membro, kiu atingas la aĝon de sepdek kvin jaroj, nova membro povas esti elektita<sup>12</sup> en la sama jaro aŭ poste.<sup>13</sup> [*Frazo pri plenaj rajtoj forigita.*]

Membro rajtas pro personaj motivoj anonci foreston de la akademia laboro, inkluzive de la voĉdonaj procedoj, por certa tempoperiodo, indikante la komencon kaj la finon de la periodo.

### Artikolo 2.2. Korespondantoj

Povas fariĝi korespondantoj de Akademio de Esperanto eminentaj personoj, kies okupoj aŭ funkcioj ne permesas al ili regule partopreni en la laboro de Akademio de Esperanto, sed kiuj deziras doni al tiu ĉi sian apogon.

Akademio de Esperanto havas maksimume dudek korespondantojn.<sup>14</sup>

---

<sup>5</sup>La eblo krei sekcion por la kontrolado de lerniloj estas menciita en artikolo 3.2, sed pro la graveco de tiu ĉi tasko la estraro nun proponas aperon jam en la unua artikolo.

<sup>6</sup>En la nuna statuto artikolo 2 preskribas: “Ĝi revizias aperintajn verkojn [...]”. La verbo *revizii* videblis en artikolo 2 dum jardekoj. Estas malfacile kompreni kiel kaj kial ĝi aperis. En aperinta verko ni ne povas revizii la enhavon kaj proponi ŝanĝojn. Tial do necesas alia verbo.

<sup>7</sup>La lasta alineo en artikolo 2 de la nuna statuto estas nun forigita, ĉar ne plu necesa.

<sup>8</sup>Memorigo pri alia aktiveco de membroj kaj korespondantoj aperas en kromsekcio 9.3.

<sup>9</sup>Laŭ informo de Osmo la statuto estu kunsendita kune kun la peto pri jura sidejo, kaj ĝi devas mencii la (estontan) sidejon, almenaŭ la landon; la ekzakta loko ne estas mencienda. Se nia peto pri jura sidejo ne estos aprobita, la artikolo malaperos.

<sup>10</sup>Klarigo pri la motivoj malantaŭ tiu nun proponata preskribo estas trovebla en kromsekcio 9.1.

<sup>11</sup>Grava novaĵo estas ke la nombrolimo koncernas nur tiujn kiuj ne atingis certan aĝon. Tiu propono gravigos la nemaljunajn membrojn.

<sup>12</sup>Teorie oni povus do elekti senliman vicon da sepdeksesjaruloj. Tamen la risko por tia okazaĵo estas tre malgranda.

<sup>13</sup>Tiu preskribo donas ian garantion ke ĉiam ekzistos certa nombro de ne tro maljunaj membroj; se ne kvardek, almenaŭ preskaŭ kvardek.

<sup>14</sup>Nun ne ekzistas iu limo pri la nombro de korespondantoj — laŭstatute povus ekzisti sescent korespondantoj.

La korespondantojn nomumas la estraro<sup>15</sup> por certa periodo, maksimume naŭ jarojn longa. Ili povas esti renomumitaj.

La korespondantoj ricevas ĉiujn akademiajn dokumentojn kaj povas esti konsultataj pri lingvaj demandoj rilataj al ilia specialeco. Ili ne havas voĉdonrajton.

Korespondanteco povas ĉesi en kvin manieroj: pro alveno al la fino de la mandato, pro elekto al membreco, pro morto, pro libervola ekziĝo aŭ pro ekzigo laŭ la preskribo en artikolo 2.7.

### Artikolo 2.3. Kandidatiĝo

Ekde Septembro<sup>16</sup> de la jaroj 2016-a, 2019-a, 2022-a k.t.p. la estraro okazigas elektojn de novaj membroj, kaj tuj post la diskonigo de iliaj rezultoj ĝi okazigas elektojn de estraranoj kaj direktoroj.

Povas esti elektita nova membro por ĉiu posteno laŭ la preskribo en la kvara alineo de artikolo 2.1 aŭ al posteno vakiĝinta pro alia kaŭzo.

Kandidatigoj aŭ memkandidatiĝoj al membreco povas esti proponataj de ĉiu ajn institucio aŭ privatulo, sed bezonas apogon de almenaŭ kvin akademianoj el tri lingvaj grupoj. Pri akiro de tiu apogo zorgas la proponanto.

Persono, kiu deziras fariĝi membro aŭ korespondanto, devas prezenti sian kandidatiĝon plej malfrue la 31-an de Aŭgusto<sup>17</sup> de la elektojaro.

Kandidato al membreco sendu al la estraro, cele al interna prijuĝo fare de la membroj, vivresumon menciantan ĉiujn meritojn atentindajn kaj deklaron pri fideleco al la principoj de la *Fundamento de Esperanto* (1905). Krome la kandidato sendu mallongan vivresumon cele al publikigo, uzotan nur se la kandidato estos elektita.

Kandidato al korespondanteco devas sendi al la estraro, cele al interna prijuĝo fare de la estraranoj, vivresumon menciantan ĉiujn meritojn atentindajn. Krome la kandidato sendu mallongan vivresumon cele al publikigo, uzotan nur se la kandidato estos nomumita.

### Artikolo 2.4. Aktivaj membroj

Rilate al specifa estonta voĉdonado membro estas konsiderata kiel *aktiva membro* se ŝi aŭ li partoprenis en almenaŭ du el la tri ĵus antaŭaj voĉdonadoj.<sup>18</sup> Preparante novan voĉdonadon la ĝenerala sekretario determinas, kiu estas aktiva membro.<sup>19</sup>

---

<sup>15</sup>La nun valida statuto ne precizigas la procedon. Ekzistas indikoj ke Gaston Waringhien kaj Geraldo Mattos, kiam ili prezidis, mem nomumis korespondantojn. La nunaj dek kvin korespondantoj estis nomumitaj fare de la estraro post interpreto de artikolo 7.

<sup>16</sup>Bonvolu pripensi ĉu tiu tempindiko estas taŭga kaj realisma por la praktika laboro. Estus ja bone, se ne nur la voĉdonado sed ankaŭ la kalkulado de la voĉoj okazos ene de la sama jaro.

<sup>17</sup>Bonvolu pripensi ĉu tiu tempolimo estas taŭga kaj realisma por la praktika laboro.

<sup>18</sup>Tiu ĉi propono fontas el propono de Sergio. Tiel la difino estas sendependa de la aĝo: ĝi dependas nur de la fakta agado de la koncerna membro. Ni povas diskuti ĉu sufiĉas unu el la tri voĉdonadoj.

<sup>19</sup>Notu ke la aktivaj membroj estas determinitaj antaŭ ĉiu voĉdonado. Se la membro voĉdonas, ŝi aŭ li povas fariĝi aktiva membro venontfoje. Kaj kompreneble ĉiu membro, ĉu aktiva aŭ ne, rajtas voĉdoni.

**Artikolo 2.5. Supera kvorumo**

Por decidoj menciitaj en artikoloj 2.6, 2.7, 3.4, 4.4 kaj 7.2 necesas *supera kvorumo*, kio signifas, ke almenaŭ du trionoj<sup>20</sup> de la aktivaj membroj partoprenas la voĉdonadon.

**Artikolo 2.6. Decidoj per balotado**

Novajn membrojn elektas la membroj de Akademio de Esperanto. Por elekto de kandidato necesas, ke supera kvorumo estu atingita kaj pli ol duono de la voĉoj estas poraj.<sup>21</sup> Estos elektitaj tiuj, kiuj ricevis plej multajn voĉojn laŭ tiuj kondiĉoj; en okazo de nombroegaleco de la voĉoj decidan voĉon havas la prezidanto.

La balotado povas okazi per voĉdoniloj sendataj per papera poŝto aŭ per elektronikaj rimedoj laŭ metodo aprobita de la estraro. Elektoj de membroj estas farataj per voĉdonadoj sekretaj.<sup>22</sup> Ĉiuj aliaj decidoj povas esti farataj per nesekreta voĉdonado.

**Artikolo 2.7. Eksigo**

Membroj de Akademio de Esperanto povas esti eksigitaj

[*La malnova 2.7.1 malaperis.*]

**2.7.1.** se ili ne partoprenas en voĉdonoj aŭ alimaniere klare montras sian nekapablon aŭ indiferenton pri la plenumo de sia ofico;

**2.7.2.** se ili agis publike<sup>23</sup> kontraŭ Esperanto ĝenerale aŭ kontraŭ la celoj de Akademio de Esperanto aparte.

Korespondantoj de Akademio de Esperanto povas esti eksigitaj, se ili publike agas kontraŭ ties celoj.

Pri eksigo de membro aŭ korespondanto Akademio de Esperanto decidas, post esploro de la klarigoj de la interesato. Por eksigo necesas, ke supera kvorumo estu atingita kaj pli ol duono de la voĉoj estas poraj.<sup>24</sup>

**Ĉapitro 3. Organizo****Artikolo 3.1. Estraro**

La estraro de Akademio de Esperanto konsistas el la *prezidanto*, unu aŭ du *vicprezidantoj* kaj la *ĝenerala sekretario-kasisto*. La laste menciita estas, se eble, salajrata; la aliaj estraranoj ne. La estraranoj havas rajton je kompenso por necesaj elspezoj.

---

<sup>20</sup>Ni povas diskuti ĉu 2/3 estas bona frackio. Eblas 3/4 kaj aliaj frackioj.

<sup>21</sup>La nuna statuto enhavas en sia artikolo 12 la preskribon “La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto la relativa plimulto decidas.” La estraro opinias ke tiuj preskriboj prefere estu striktigitaj kiel indikite.

<sup>22</sup>Ni ja delonge faras tiel. Eble estas bone menci i tion eksplice.

<sup>23</sup>La nuna statuto mencias ankaŭ kaŝan agadon. Sed eltrovi tion estas malfacile; necesus dungi la detektivojn Tsicerono kaj Citserono.

<sup>24</sup>En la nuna statuto artikolo 14 preskribas: “En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.” Sed tio nun ne estas bezonata.

### Artikolo 3.2. Sekcioj

En Akademio de Esperanto estas organizataj *sekcioj*, kiuj studas demandojn rilatajn al specialaj lingvaj fakoj (ekzemple faka lingvo, gramatiko, ĝenerala vortaro, lingva konsultejo, literaturo, prononco, kontrolado de lerniloj). Post preparo fare de la estraro Akademio de Esperanto rajtas laŭbezone krei novajn sekciojn. Por tia decido necesas, ke pli ol duono de la voĉoj estu poraj.

Ĉiu sekcio estas gvidata de *direktoro*. Ĉiu membro kaj korespondanto rajtas aliĝi al unu aŭ pluraj sekcioj, por kiuj ŝi aŭ li sentas sin speciale kompetenta aŭ al kiuj ŝi aŭ li volas prefere dediĉi siajn fortojn.

Direktoro de sekcio rajtas inviti al kunlaboro specialistojn ekster Akademio de Esperanto.<sup>25</sup>

### Artikolo 3.3. Komisionoj

Akademio de Esperanto povas starigi *komisionojn* por la plenumado de specifaj taskoj. Post preparo fare de la estraro la pleno aprobas la celon kaj funkciadon de ĉiu komisiono. Por tia aprobo necesas, ke pli ol duono de la voĉoj estu poraj.

Komisiono respondecas antaŭ la estraro. Raportoj de ĉiu komisiono informas la plenen pri ties agado.

Direktoro de komisiono rajtas inviti al kunlaboro specialistojn ekster Akademio de Esperanto.

### Artikolo 3.4. Elektoj

La estraranoj kaj direktoroj de sekcioj kaj komisionoj estas elektataj de Akademio de Esperanto por tri jaroj en la jaroj 2016-a, 2019-a, 2022-a k.t.p., kaj tuj post la elektoj de novaj membroj. Por elekto de estrarano aŭ direktoro necesas, ke supera kvorumo estu atingita kaj pli ol duono de la voĉoj estas poraj.<sup>26</sup> Se per tiu preskribo prezidanto, ĝenerala sekretario aŭ du vicprezidantoj ne povas esti elektitaj, la estraro organizas novan elektan proceduron kaj restos ĝis nova estraro povos funkcii.<sup>27</sup>

La elirantaj estraranoj kaj direktoroj estas reelekteblaj.

En okazo de intertempe vaka posteno en la estraro la prezidanto aŭ unu el la vicprezidantoj okazigas elekton por la restanta tempo de la trijara periodo.<sup>28</sup> Tamen, se vakas nur unu el la du postenoj de vicprezidanto, la ceteraj estraranoj rajtas decidi plulabori kiel tripersona estraro.

[*Artikolo 3.5 forigita.*]

<sup>25</sup>Novaĵo, kopiita el la artikolo pri komisionoj.

<sup>26</sup>La nuna artikolo 18 ne enhavas similan preskribon.

<sup>27</sup>Novaĵo.

<sup>28</sup>La nuna statuto enhavas en sia artikolo 18 la preskribon: “La intertempe elektita Estrarano estas submetata al rebaloto ĉe la fino de la kuranta trijara periodo. Tio sama validas por la direktoroj.” Tiu regulo ŝajnas esti sen praktika signifo, ĉar je la fino de la trijara periodo la mandato de estrarano aŭ direktoro ja ĉiuokaze finiĝas.

## Ĉapitro 4. Decidoj

### Artikolo 4.1. Esploraĵoj

Akademio de Esperanto devas esplori demandojn prezentitajn al ĝi de unu el la sekvantaj instancoj:

4.1.1. La prezidanto aŭ la estraro;

4.1.2. La direktoro de unu el la sekcioj aŭ komisionoj;

4.1.3. Almenaŭ kvin membroj.

Akademio de Esperanto povas ankaŭ esplori demandojn prezentitajn al ĝi de esperantista organizaĵo, de unuopa persono aŭ de grupo de personoj.

### Artikolo 4.2. Sekcia laboro

Se lingva demando apartenas al la laborkampo de iu sekcio, la direktoro de tiu sekcio, konsultinte ties membrojn, ellaboras raporton. Se ne ĉiuj sekcianoj samopinias, la raporto prezentu la diversajn vidpunktojn, kaj, post ĝia komunikado al la membroj, la estraro devas lasi intertempon de almenaŭ unu monato<sup>29</sup> antaŭ ol voĉdonigi la membrojn pri la konkludoj de la raporto.

La estraro povas en sia decido pri voĉdonado aldoni sian opinion pri la raporto, kaj rajtas decidi ne okazigi voĉdonadon.

Sekcioj kaj komisionoj, same kiel unuopaj membroj, rajtas formuli rekomendojn. Tiaj rekomendoj ne estas oficialaj.

### Artikolo 4.3. Akademia decido

Pri ĉiu studita demando Akademio de Esperanto povas alpreni decidon. Decido povas esti rekomendo aŭ malrekomendo de lingva fenomeno, aŭ definitiva aprobo aŭ malaprobo.

### Artikolo 4.4. Proceduro

Akademio de Esperanto solvas al ĝi submetitajn lingvajn demandojn laŭ la principoj de la *Fundamento de Esperanto* (1905).

Pri ĉiuj demandoj rilataj al lingvouzo Akademio de Esperanto decidu. Por decido necesas, ke supera kvorumo estu atingita kaj pli ol duono de la voĉoj estas poraj.<sup>30</sup> Se temas pri ŝanĝo de pli fruaj decidoj de Akademio de Esperanto aŭ de la antaŭa Lingva

---

<sup>29</sup>La nuna statuto preskribas dumonatan intertempon. Ĉu unu monato sufiĉus?

<sup>30</sup>En la nuna statuto artikolo 23 preskribas: “En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.” Sed tio nun ne estas bezonata.

Komitato, necesas, ke supera kvorumo estu atingita kaj almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas poraj.<sup>31</sup> <sup>32</sup>

La voĉdonoj povas okazi per voĉdoniloj sendataj per papera poŝto aŭ per elektronikaj rimedoj laŭ metodo aprobita de la estraro.

## Ĉapitro 5. Eldonaĵoj

Akademio de Esperanto povas publikigi dokumentojn de diversaj specoj, surpapere presitajn aŭ rete alireblajn aŭ en ambaŭ formoj. Povas temi pri *Oficialaj Informoj*, *Oficialaj Bultenoj*, *Cirkuleroj*,<sup>33</sup> *Aktoj* kaj libroj.

## Ĉapitro 6. Financoj

### Artikolo 6.1. Fontoj

Akademio de Esperanto trovas siajn financajn fontojn en subvencioj de esperantistaj organizaĵoj, kiuj volas subteni ĝian laboron, kaj en donacoj.

### Artikolo 6.2. Kontoj

Ĉiujare la kontoj de Akademio de Esperanto estas publikigataj.

## Ĉapitro 7. Ŝanĝoj en la statuto

### Artikolo 7.1. Propono pri ŝanĝo

Proponi ŝanĝon en la statuto rajtas ĉiu akademiano, kaj tiu propono devas esti submetita al voĉdono, se almenaŭ kvar aliaj membroj ĝin apogas.

### Artikolo 7.2. Ŝanĝo

Pri propono por ŝanĝo en la statuto decidas Akademio de Esperanto post raporto de la estraro. Por decido necesas, ke supera kvorumo estu atingita, ke almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas poraj kaj, ke krome voĉdonas pore almenaŭ du trionoj de tiuj membroj, kiuj ne anoncis foreston laŭ la lasta alineo en artikolo 2.1.

---

<sup>31</sup>La nuna statuto preskribas en sia artikolo 23: “Se temas pri enkonduko de lingva novaĵo aŭ pri ŝanĝoj de pli fruaj decidoj de la Akademio aŭ de la Lingva Komitato, la aprobo de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj estas necesa.” Ĉar neniu difinis kio estas lingva novaĵo, kaj ĉar eble neniu povos tion difini, la estraro proponas ke tiu frazo malaperu. Tamen restu la preskribo pri ŝanĝo en pli fruaj decidoj.

<sup>32</sup>La nuna statuto enhavas en sia artikolo 23 la preskribon “Se laŭ la supraj kondiĉoj decido ne povas esti atingata, la demando estas submetata al nova voĉdono.” La estraro opinias ke ni prefere forlasu tiun preskribon. Tiel la estraro rajtos aŭ entute forlasi la aferon aŭ okazigi novan voĉdonadon.

<sup>33</sup>La akademio dum jardekoj dissendis cirkulerojn, kvankam tiu formo de publikigo ne estas menciita en la nuna statuto, nek en la antaŭaj.

## Ĉapitro 8. Decidoj pri la transiro

### Artikolo 8.1. Ekvalido

Se aprobita per voĉdonado laŭ artikolo 29 en la nuna statuto (redakta revizio de 2009-10), tiu ĉi statutpropono fariĝos valida statuto la unuan tagon de la monato post la aprobo.

### Artikolo 8.2. Dumvivaj membroj

La personoj, kiuj estas membroj, kiam tiu ĉi statuto ekvalidas, fariĝas dumvivaj membroj.

### Artikolo 8.3. Korespondantoj

Ĉiu korespondanto konservas sian statuson kiel korespondanto dum la jam decidita periodo.

### Artikolo 8.4. Estraranoj kaj direktoroj

La estraranoj kaj direktoroj restas laŭ antaŭa elekto. Novaj elektoj de estraranoj kaj direktoroj okazos ekde Septembro<sup>34</sup> en la jaroj 2016-a, 2019-a, 2022-a, k.t.p.

—

---

<sup>34</sup>Ĉu taŭga tempindiko?



## Kromĉapitro 9. Klarigoj

Multaj mallongaj klarigoj pri la motivoj estas troveblaj en la piednotoj, sed kelkaj estas tro ampleksaj por konvena lokigo tie kaj tial kolektitaj en tiu ĉi kromĉapitro. La kromĉapitroj ne estos parto de la statuto.

### 9.1. Motivoj malantaŭ la propono

La plej gravaj motivoj malantaŭ la nuna propono estas:

1. Altigi la renomon kaj prestiĝon de nia akademio: membreco estas pli prestiĝa se ĝi estas dumviva. Oni atendas tion de lingva aŭ scienca akademio.
2. Gravigi la rolon de junaj membroj per la preskribo ke, kiam membro atingas certan aĝon, la akademio povas elekti novan membron.
3. Ne malhelpi membrojn esprimi sin pro timo ne esti reelektitaj — tia timo povas influi la konduton de la membro, kio estos mallarĝiĝo de la lingva, kultura kaj scienca spektro de la akademio.
4. Ne malhelpi membrojn labori pri projektoj pri kiuj ili pensas (prave aŭ malprave) ke la projektoj servos kiel pretekstoj ne reelekti ilin.
5. Faciligi — se la akademio tion deziras — aliĝon al federroj de akademioj lingvaj aŭ sciencaj.
6. Faciligi por la akademio alveni al decidoj en iuj okazoj (sed ne en ĉiuj).
7. Malaltigi la kvanton da administra laboro kunligita kun la elektoj, kiu tenas la membraron pli-malpli blokita ĉiun trian jaron, kaj liberigi la membrojn de laboro kiu povas esti malŝparo de tempo kaj iam eĉ povas esti malutila por ilia aktiveco. Kvankam ne inter la laŭprincipaj motivoj, tiu observo indikas praktikajn sekvojn de la nova statuto.

La propono estis inspirita i.a. de ideoj esprimitaj de Carlo Minnaja, Marcos Cramer kaj aliaj.

### 9.2. Komparo kun aliaj akademioj

#### 9.2.1. Similecoj

La taskoj listigitaj en artikolo 1.1 montras ke la akademio havas taskojn tute paralelajn al tiuj de *Académie française* ‘Akademio franca’ (kun 40 membroj) kaj *Svenska Akademien* ‘La Sveda Akademio’ (kun 18 membroj). Do ekzistas simileco; ankaŭ en tio ke la lingvokomunumoj foje sekvas, foje tute ne sekvas la konsilojn de la respektivaj akademioj.

#### 9.2.2. Malsimilecoj

Malsimileco estas ke Akademio de Esperanto havas malpli da mono por premioj ol la du aliaj.

### 9.3. Memorigo pri aliaj aktivecoj de la membroj kaj korespondantoj

Ekster la taskoj menciitaj en artikolo 1.1 membroj kaj korespondantoj faras multon kio ne eniras en la formalan kadron de la akademia laboro.

Menciindas la kunlaboro en gravaj vortaroj kiel PIV kaj ties posteuloj NPIV kaj PIV 2005; verkado de poezio, de romanoj kaj de libroj pri diversaj fakoj; prelegoj; tradukoj de kulture valoraj libroj; instruado, ĉu interpersone aŭ perrete; kaj multaj aliaj aktivecoj kiuj ne formale estas parto de la akademia laboro, sed kiuj gravege kaj konstante kontribuadas al la renomo de la akademio.

Por unuopa membro la voĉdonado normale estas nur eta parto de la aktiveco por la lingvo kaj por la kulturo kiun ĝi portas.

### 9.4. Ĝenerala komento pri voĉdonado

En la formulado de reguloj ne eblas antaŭvidi ĉiujn trukojn kiuj povos esti uzataj. Tiel nomatan taktikan voĉdonadon oni ne povas kun certeco malebligi — eĉ ne per tre komplikaj reguloj. Pli bone estas formuli regulojn kiuj ŝajnas esti justaj, kaj esperi je la honesteco de la membroj.

Marcos skribis 2014-01-17 pri ŝanĝoj en la proceduroj cele al plifaciligado en la atingado de decidoj. La estraro opinias ke la eblo elekti novan membron kiam membro atingas certan aĝon kune kun la postulo de supera kvorumo en certaj artikoloj, same kiel la permeso foresti dum certa periodo, estas paŝoj en tiu direkto.

Sed ne sufiĉas ke la jesoj nombras pli ol la neoj; decido havu larĝan bazon ĉe la membraro. Se la akademio pro tio foje ne alvenos al decido, ne estos katastrofo.

### 9.5. Decidoj per voĉdonado

Kelkaj decidoj estu facile atingeblaj; aliaj nur malfacile atingeblaj. Tial necesas pluraj malsamaj preskriboj pri partopreno en voĉdonadoj kaj pri la necesa nombro de poraj voĉoj. En la nuna subsekcio ni detaligas ilin.

La estraro proponas ke ni uzu kvar tipojn de kondiĉoj, menciitaj en subsekcioj 9.5.1–9.5.4.

#### 9.5.1. Artikoloj 3.2 kaj 3.3

En tiuj du artikoloj sufiĉu plimulto de la voĉdonantoj.

#### 9.5.2. Artikoloj 2.6, 2.7, 3.4 kaj 4.4 (unua parto)

En preskriboj pri decidoj ofte temas (*A*) pri frakcio de ĉiuj membroj kaj (*B*) pri frakcio de ĉiuj voĉdonantoj. Unuflanke la akademio bezonas fortan esprimon de la membroj; aliflanke estas bone ne tro dependi de tio ke kelkaj membroj ne voĉdonas. Pro tio la estraro nun proponas ke la frakcio *A* ne estu kalkulita ekde ĉiuj membroj, sed laŭ la difino de supera kvorumo en artikolo 2.5, dum la frakcio *B* estu  $> 1/2$ , do ekzemple 19 poraj voĉoj, se estas 36 aŭ 37 voĉdonantoj; kaj 20 poraj voĉoj, se estas 38 aŭ 39 voĉdonantoj.

### 9.5.3. Artikolo 4.4 (lasta parto)

La estraro proponas ke por ŝanĝo de antaŭa decido necesos, ke supera kvorumo estu atingita kaj almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas poraj, do pli strikta kondiĉo ol en la artikoloj 2.6, 2.7, 3.4 kaj 4.4 (unua parto).

### 9.5.4. Artikolo 7.2

La estraro proponas ke por ŝanĝo de la statuto necesos ke supera kvorumo estu atingita kaj almenaŭ du trionoj de la voĉoj estas poraj, kaj ke voĉdonas pore almenaŭ du trionoj de tiuj membroj, kiuj ne anoncis foreston laŭ la lasta alineo en artikolo 2.1.

## 9.6. Komparo inter la nuna statuto kaj la propono

### 9.6.1. Artikolo 12. Balotado — Artikolo 2.6. Decidoj per balotado

*Artikolo 12:* “[...] per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto relativa plimulto decidas.”

*Komento:* Se malmultaj voĉdonas, estos por tiu nova membro malforta mandato — se nur “relativa plimulto”, tiam eĉ pli malforta. Tial prefere pli strikte kiel en artikolo 2.6.

### 9.6.2. Artikolo 14. Eksigado — Artikolo 2.7. Eksigo

*Artikolo 14:* “[...] per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj.”

*Komento:* Eksigo devas esti malfacila; ebla nur en tre evidentaj okazoj. Tial nun pli strikte en artikolo 2.7.

### 9.6.3. Artikolo 18. Elektoj — Artikolo 3.4. Elektoj

En la nuna artikolo 18 ne estas menciita iu kondiĉo. La estraro nun proponas kondiĉojn, la samajn kiel en kelkaj aliaj artikoloj.

### 9.6.4. Artikolo 23. Proceduro — Artikolo 4.4. Proceduro (unua parto)

*Artikolo 23:* “per absoluta plimulto de la voĉdonantoj, se almenaŭ du trionoj de la membroj voĉdonis, alie per absoluta plimulto de ĉiuj membroj.”

*Komento:* Se malmultaj voĉdonas, estos malfacile alveni al decido. Tial limigo laŭ la difino de supera kvorumo en artikolo 2.5 estos ebla solvo; vidu artikolon 4.4.

### 9.6.5. Artikolo 23. Proceduro — Artikolo 4.4. Proceduro (lasta parto)

*Artikolo 23:* “Se temas pri enkonduko de lingva novaĵo aŭ pri ŝanĝoj en pli fruaj decidoj de la Akademio aŭ de la Lingva Komitato, la aprobo de almenaŭ du trionoj de ĉiuj membroj estas necesa.”

*Komento:* La estraro proponas ke la mencio de “lingva novaĵo” (kiun neniu difinis) malaperu.

## **Kromĉapitro 10. Venontaj elektoj**

Tiu ĉi kromĉapitro estas enmetita nur por doni ideon pri la amplekso de venontaj elektoj kaj estas celita nur al la interna diskuto inter la membroj.

Akademio de Esperanto havas hodiaŭ 41 membrojn. El ili 28 naskiĝis en 1941 aŭ pli malfrue. Ekzistas 22 membroj kiuj naskiĝis en 1946 aŭ pli malfrue, kaj 18 membroj kiuj naskiĝis en 1951 aŭ pli malfrue. Pli detalan superrigardon donas la tabelo sur paĝo 13.

Akademio de Esperanto povos en la jaro 2016-a elekti novajn membrojn por tiuj kiuj naskiĝis en 1941 aŭ pli frue. Ĝi povos en la jaro 2017-a elekti novajn membrojn por tiuj kiuj naskiĝis en 1942 aŭ pli frue, k.t.p.; ĉio kun la kondiĉo ke la akademio fiksos la aĝlimon je 75 jaroj. Facilas trovi la jarojn se ĝi elektas alian aĝlimon.

*Membroj de Akademio de Esperanto laŭ naskiĝjaro*  
 Ordo laŭ kreskanta naskiĝjaro. Se la jaroj samas, nur alfabeto ordo.

<i>Nomo</i>	<i>Naskiĝjaro</i>	<i>Elektjaro</i>	<i>Fino de la nuna mandato</i>
Marjorie Boulton	1924	1967	2022
Saka Tadasi	1927	2007	2016
Carmel Mallia	1929	1995	2022
Yamasaki Seikō	1929	1992	2019
Baldur Ragnarsson	1930	1979	2016
Nguyen Xuan Thu	1932	2013	2022
Michel Duc Goninaz	1933	1976	2022
Erich-Dieter Krause	1935	1986	2019
Christer Kiselman	1939	1989	2016
Boris Kolker	1939	1992	2019
Humphrey Tonkin	1939	1983	2019
John C. Wells	1939	1970	2022
Carlo Minnaja	1940	1973	2019
Renato Corsetti	1941	1998	2016
Harri Laine	1943	2013	2022
Otto Prytz	1943	2004	2022
Gerrit Berveling	1944	1989	2016
Barbara Pietrzak	1944	2007	2016
Vilmos Benczik	1945	2001	2019
Ma Young-tae	1946	2007	2016
Brian Moon	1947	1998	2016
Paul Gubbins	1949	2007	2016
Sergio B. Pokrovskij	1949	1995	2022
Anna Lowenstein	1951	2001	2022
Aleksander Melnikov	1951	2013	2022
Probal Dasgupta	1953	1983	2019
Koutny Iona	1953	1998	2016
Stano Marček	1953	2010	2019
François Lo Jacomo	1954	1989	2016
Amri Wandel	1954	1992	2022
Jouko Lindstedt	1955	1998	2016
Alexander Shlafer	1956	2010	2019
Bertilo Wennergren	1956	2001	2019
Katalin Kováts	1957	2007	2016
Ranganayakulu Potturu	1958	2013	2016
Tsvi Sadan	1963	2013	2022
Edmund Grimley Evans	1966	2013	2019
Usui Hiroyuki	1967	2013	2022
Pavel Možajev	1981	2010	2019
Marcos Cramer	1984	2010	2019
Marek Blahuš	1986	2013	2022